# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Terry Manley



PLENUMITA 15/08/2024 sepcenta eldono (unua eldono 26/09/2011)

**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esprantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj Do aŭskultu ĉiujn.

Aŭskultu kaj ripetu - porcio 12 12/08/2024

## LEGU, LERNU, ĜUU




Ĵus eldoniĝis nova libro de nia Trevor Steele. "Iam ni trovos hejmon" temas pri kuranta problemo mondvasta. De la unua paĝo oni lernas iomete pri la historio, antikva kaj nuna, de afganaj hazaroj kaj de myanmaraj rohinĝoj. Kaj pli detale pri la vojaĝoj de azilpetantoj celante vivi en Aŭstralio, kaj la sorto, kiu ilin atendas en la insuloj Christmas, Naŭro kaj preskaŭekvatora Manus. Ho ve la hororo antaŭ surteriĝo sin trovi en kadukinĝinta boateto meze de terura, senkompata marŝtormo. Kaj la ega desapontiĝo, por kelkaj vera koŝmaro, post entuziasma revo anticipe al bonvenigo fare de bonkora, demokratia lando, kiu nepre brakoetendiĝe akceptos la povrulojn fuĝantajn pro torturo, perforto, mortigo. Sed, ne...*Vi neniam rajtos surtreti aŭstralian teritorion.*

Verkita laŭ la kutime bela, simpla stilo de Trevor Steele, ege trafa, fojfoje nemiskompreneble lang-en-vanga, ĉi tiu bone esplorita rakonto, kaj fakta kaj fikcia, nepre meritas legadon. Povas esti, ke la genocida situacio en Gaza nuntempe priokupas nin pli ol tiu de la kompatindaj azilpetantoj, kiuj daŭre provas trovi por si mem novan domon; eble la koŝmara hontaĵo en Gaza igas la situacion de ensloŝitaj azilpetantoj (kelkaj por dek jaroj, aŭ eĉ pli) ŝajni bagatela afero kompare, sed se tio veras, kial tiom da suicidoj, mensmalsano, lipokudraĵo, kaĵ tiel plu? Kiajn diablaĵojn niaj registaroj kulpas? *La plej bonaj jaroj de la vivo forrampas en stultega neniofarado.* Trevor Steele substrekas la daŭran turmenton de tago-post-tago necerteco, psiĥa premo, kaj ankaŭ de krimoj kaj suferitaj kaj faritaj en la malhumanaj homtenejoj.

Eĉ se oni ne emas studi la temon, ĉi tiu ne tre longa romano tamen donas superrigardon, pere de tenera amrakonto. Mi rekomendas. *Vera Payne*



(La libro estas aĉetebla ĉe FEL, ankaŭ de la aŭtoro.)

# La 109a UK ĵus okazis en Aruŝa, Tanzanio.

Unuafoje la kongreso okazis en Afriko. Kelkaj aŭstralianoj partoprenis inkluzive de Heather Heldzingen.

Vi povas legi la kongresajn kurierojn en la retejo de UEA. Jen foto de Heather kun Ilia el Indonezio kaj fotoj montrante multajn partoprenantojn






n.            Amike, Nicole Else



# La Jarkunveno de EFNSK okazos **sabaton la 7an de septembro je la 11a horo matene**.

Ĝi okazos **reale en Esperanto-domo** 143 Lawson Street, Redfern **kaj virtuale** per la programo Zoom. https://us06web.zoom.us/j/81218899807?pwd=hrVtWG5S4lsgalGixWUJKO9ogb5krS.1

(Meeting ID: 812 1889 9807 Passcode: 036240)
Tuj post la jarkunveno okazos senpaga komuna manĝo kun tempo por babili kaj ekzerci paroli Esperanton. Je la 12:30 komenciĝos librofoiro. Ĝi havos 2 partojn, en unu parto estos senpagaj libroj por la membroj kaj en la alia parto estos aĉeteblaj libroj. Uzu tiun eblecon por akiri interesajn legaĵojn sen bezono pagi multekostajn sendokostojn. Bonvolu legi la venontan Telopeon por pliaj informoj. La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon. La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK. Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe http://esperantohouse.org.au/eo/about-us/), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:

- That Nicole Else, Alan Turvey and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:- prezidanto- vicprezidanto - ĝenerala estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: **nsw@esperanto.org.au** Aŭ poŝte al:
EFNSK Esperanto House 143 Lawson St Redfern NSW 2016

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon. Bonvolu konfirmi, ke vi bone ricevis tiun invitilon kaj sciigi nin, ĉu vi ja intencas ĉeesti aŭ ne kaj se jes, ĉu vi deziras ĉeesti persone aŭ virtuale. Ankaŭ bonvolu sciigi nin se vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion. Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.



Amike, *Nicole Else* Sekretario, EFNSK

Bonvolu respondi Invito al la jarkunveno/ invitation to the AGM of the NSW Esperanto Federation

# AEA - Estrarkunveno - 2024-08-08

Ĉeestos: Joanne Johns, Jonathan Cooper, Terry Maley, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner (Heather Heldzingen estis ĉe la UK en Aruŝo)

## (1) Somerkursaro 2025

- La preparado daŭras.

Nia plej grava problemo estas kaj restas:

**KIEL ALLOGI PARTOPRENANTOJN AL NIA SOMERKURSARO**

Jen kelkaj ideoj de niaj ideoj: - proponi nin al radio stacioj kiel gastparolsnto

- U3A proponi nin.... maljunuloj havas genepojn
- Disdono de niaj "vizitkartoj" en iu ajn loko
- Telefoni membrojn kaj nemembrojn kaj ankaŭ demandi ilin kiel ni allogu partoprenantojn
- Dum ĉiu kunveno ni raportu... kion ni faris dum la lastaj du semajnoj por allogi partoprenantojn
- Granda elsendo al lernejoj/universitatoj... eble eĉ stipendio(?)
- Kontakti instruistojn, kiujn ni persone konas
- Certigu ke esperantistoj en aliaj ŝtatoj sciu pri la somerkursaro ..... kaj
- Regulaj retmesaĝoj al niaj membroj pri la preparado

Bradley: Espereble "kelkaj venos el NZ?

## (2) Esperanto Domo en Melburno

La serĉado daŭras.... ne multe okazis (foresto de Heather)

## (3) Prelegserio:

La venonta okazos venontan, **Dimanĉon, la 18-an de aŭgusto** je la **16:45** (sidneja tempo!!!)

## Petr CHRDLE (Ĉeĥio)

**(Mal)konvena informado pri Esperanto**

Fama ĉeĥa esperantisto Petr Chrdle ĝojigas kaj defias vin per surprizaj faktoj pri nia lingvo. Certigu ke vi aliĝu al la diskuto. **16:45 en Sidnejo**

## (4) ESK

Baldaŭ aperos. Ne hezitu kontribui.

**(5) La venonta kunveno** okazos: **Jaŭdon, la 22-an de aŭgusto 2024 je la**

17:00 NSW, VIC, QLD, TAS, ACT 16:30 NSW, NT 15:00 WA

Partoprenu kaj helpu kun la organizado de la kongreso. *Sandor Horvath*

**El Adelajo** La 1-an de aŭgusto okazis zoom-a kunveno de la adelajdaj klubanoj. La ĉefparolanto estis Trevor Steele. En 1990-91 li pasigis unu jaron en Sovetunio. Li estis ne nur en Rusio, sed ankaŭ en Ukrainio kaj Estonio. Dum li estis ankoraŭ tie, okazis la puĉo kontraŭ Gorbaĉov. Pri la strečaj tagoj de la granda ŝanĝo kaj ankaŭ pri la ĉiutagaj spertoj de aŭstralia esperantisto ni aŭdis preskaŭ unuhoran rakontadon, ilustritan per multaj bildoj. *Katja Steele*